

**La letero de 'Abdu'l-Bahá  
al  
d-ro Auguste Henri Forel**

## **La letero de 'Abdu'l-Bahá al d-ro Auguste Henri Forel**

Letero de 'Abdu'l-Bahá el 1921.

La origina persa teksto unue publikiĝis en Kajro en 1922.

Esperantlingva traduko el la angla traduko en la  
Bahá'í Reference Library (<https://www.bahai.org/library/>)

Bahaa Esperanto-Ligo (BEL)

Eppsteiner Str. 89, DE-65719 Hofheim-Langenhain, Germanio

bel@bahai.de – <https://bel.bahai.de>

© Bahaa Esperanto-Ligo, 2024

Hofheim-Langenhain

## La letero de 'Abdu'l-Bahá al d-ro Auguste Henri Forel<sup>1</sup>

Ho ege respektata persono, veramanto! Via letero datita la 28-an de julio 1921 estas ricevita. Ĝia enhavo estas altagrade plaĉa kaj indikis, ke, laŭdata estu la Sinjoro, vi estas ankoraŭ juna kaj serĉas la veron, ke via pensopovo estas forta kaj la malkovroj de via pensado manifestaj.

Multnombraj kopioj de la epistolo, kiun mi skribis al d-ro Fischer<sup>2</sup>, dissendiĝis diversdirekten kaj ĉiuj scias, ke ĝi estis revelaciita en la jaro 1910. Krom tio multaj epistoloj estis skribitaj antaŭ la milito pri la sama temo, kaj estas aludoj al tiuj ĉi demandoj en la Revuo de la Universitato San-Francisko, kies dato estas sendispute konata.<sup>3</sup> Sammaniere alte laŭdis la filozofoj kun vasta kompreno la diskurson

---

<sup>1</sup> Origina persa teksto unue publikiĝis en Kajro en 1922. La letero estis skribita en 1921. Vidu ankaŭ *Star of the West* (Outer vol. 7.) vol. 13. n-ro 8, p. 193–202. Tiu ĉi traduko baziĝas sur la angla traduko en la *Bahá'í Reference Library* (<https://www.bahai.org/library/>), kiu siavice baziĝas sur angla traduko aperinta en *The Bahá'í World* volumo XV 1968–1973. paĝoj 37–43. Tiu ĉi esperanta traduko estas reviziita versio de tiu publikita en: Paul Desailly, *Realigas la mondan pacon. La Bahaa Kredo kaj Esperanto*, 2003, p. 127–133. Ne klaras, kiu faris la originan esperantan tradukon; unu supozo estas ke ĝin faris Edmond Privat (1889–1962).

D-ro Auguste Henri Forel (1848–1931), Svislando, kiu iĝis bahaano en 1920. Liaj fakaj kampoj estis entomologio kaj psikologio. Dum multaj jaroj li estris la fakultaton de psikologio en Zuriko. »Per sia nelacigebla esplorado d-ro Forel grave aldonis al sciencaj scioj kaj nemezureble servis al la homaro.« (*In Memoriam, The Bahá'í World*, volumo V, paĝo 420.)

<sup>2</sup> Surbaze de historiaj dokumentoj konjekteblas ke „d-ro Fischer“ fakte devus esti d-ro Josephine Fallscheer.

<sup>3</sup> 'Abdu'l-Bahá aludas al Sia parolado en Stanford University, Palo Alto, Kalifornio, en 1912, kiu estis publikigita en la loka ĵurnalo kaj aperas ankaŭ en la kolekto de Liaj paroladoj en Nordameriko kun la titolo *The Promulgation of Universal Peace*.

elokvente prezentitan en la supre menciita universitato.<sup>4</sup> Kopio de tiu teksto estas do enmetita kaj kunsendata. Viaj verkoj estas sendube tre utilaj; se ili estos publikigitaj, sendu al ni kopion de ili.

La vorto materiistoj, kies kredo rilate al Dieco estis klarigita, ne aludas al filozofoj ĝenerale, sed al tiu grupo de mallarĝpensaj materiistoj, kiuj adoras tion senseblan, kiuj dependas de nur la kvin sensoj kaj kies kriterio de scio estas limigita al tio perceptebla de la sensoj. Ĉio sensebla estas por ili reala, dum ĉio ekster tio perceptebla de la sensoj estas aŭ nereala aŭ dubinda. La ekziston de Dio ili konsideras tute dubinda.

Estas tiel, kiel vi skribis: ne filozofoj ĝenerale, sed mallarĝmensaj materiistoj estas aluditaj. Diistaj filozofoj, ekzemple Sokrato, Platono kaj Aristotelo, ja meritas estimon kaj altan laŭdon, ĉar ili faris eksterordinarajn servojn al la homaro. Simile ni rigardas la materiistajn, kapablajn, moderajn filozofojn, kiuj servas al la homaro.

Ni rigardas scion kaj saĝon kiel la fundamenton de la progreso de la homaro kaj alte taksas filozofojn kun larĝa kompreno. Zorge studu la San Francisco University Journal, ke la vero riveligu al vi.

Se temas pri mensaj kapabloj, ili vere estas denaskaj ecoj de la animo, same kiel la disradiado de lumo estas la esenca eco de la suno. La sunradioj renoviĝas, sed la suno mem daŭre restas la sama kaj neŝanĝita. Konsideru kiel la homa intelekto evoluas kaj malfortiĝas, kaj povas foje neniigi, dum la animo ne ŝanĝiĝas. Por ke la menso povas manifestiĝi, devas la homa korpo esti integra; kaj sana menso ne povas esti krom en sana korpo, dum la animo ne dependas de la korpo. Per la potenco de la animo la menso komprenas, imagas kaj influas, dum la animo estas potenco libera. La menso komprenas tion abstraktan helpe de la konkreta, sed la animo havas senlimajn manifestaĵojn proprajn. La menso havas siajn limojn, la animo estas senlima. Helpe de tiaj sensoj kiaj vido, aŭdo, gustumo, flaro kaj tuŝo, la menso komprenas, dum la animo estas libera je ĉiaj iloj. La animo, kiel vi observis, moviĝas kaj ĉiam aktivas, ĉu ĝi dormas aŭ ne. Eble ĝi,

---

<sup>4</sup> Tie 'Abdu'l-Bahá distingas inter la materiisma kaj empiriisma filozofio de la moderna Okcidento kaj la norma raciisma filozofio de la grekoj kaj persoj, kaj Li reliefigas la diferencon inter teorioj pri la esenco de la naturo kaj la origino de la homo.

dum sonĝo, deĉifras kompleksan problemon nedeĉifreblan en la maldorma stato. Krome la menso ne komprenas kiam la sensoj ne plu funkcias, kaj en la embria stato kaj frua infanaĝo la potenco rezoni tute mankas, dum la animo ĉiam estas plene potenca. Konscize, estas multaj pruvoj, kiuj montras, ke malgraŭ perdo de rezonkapablo la potenco de la animo daŭre ekzistas. Sed la spirito ekzistas en diversaj gradoj kaj stadioj.

Pri la ekzisto de spirito en mineraloj: estas nedubeble, ke mineraloj havas spiriton kaj vivon laŭ la bezonoj de tiu ekzistoetapo. Tiu nekonata sekreto fariĝis sciata ankaŭ de materiistoj, kiuj nun asertas, ke ĉiuj estaĵoj havas vivon, ĝuste kiel Li diras en la Korano: »Ĉio vivas«.

Ankaŭ en la regno de la vegetaĵoj estas kreskopotenco, kaj tiu kreskopotenco estas la spirito. En la besta mondo estas sentado, sed en la homa mondo estas ĉio-ampleksa potenco. En ĉiuj pli fruaj etapoj mankas la rezonpotenco, sed ekzistas la animo kaj sin rivelas. Sentado ne komprenas la animon, dum la rezonpovo de la menso pruvas ĝian ekziston.

Sammaniere la menso pruvas la ekziston de nevidebla Realo, kiu ampleksas ĉiujn estaĵojn kaj ekzistas kaj sin rivelas en ĉiuj etapoj, kaj ĝia esenco superas la komprenpovon de la menso. Tial la minerala mondo komprenas nek la naturon nek la perfektaĵojn de la vegeta mondo; la vegeta mondo ne komprenas la naturon de la besta mondo, nek komprenas la besta mondo la naturon de la realo de la homo, kiu malkovras kaj ampleksas ĉiujn aferojn.

Besto estas kaptito de la naturo kaj ne povas preteriri ĝiajn regulojn kaj leĝojn. En la homo tamen estas malkovra potenco, kiu transcendas la mondon de la naturo kaj regas kaj superas ĝiajn leĝojn. Ĉiuj mineraloj, plantoj kaj bestoj, ekzemple, estas kaptitoj de la naturo. La suno mem kun sia tuta majesto estas tiel submetita al la naturo, ke ĝi ne havas propran volon kaj ne povas spiti eĉ en la plej eta grado ĝiajn leĝojn. Sammaniere ĉiuj aliaj estaĵoj, ĉu el la minerala, la vegeta aŭ la besta mondo, ne povas deflankiĝi de la naturleĝoj, ĉiuj estas iliaj sklavoj. La homo, kontraste, kvankam korpe kaptito de la naturo, estas libera en siaj menso kaj animo kaj regas super la naturo.

Konsideru: laŭ la naturleĝoj la homo vivas, moviĝas kaj restas sur la

tero, sed liaj animo kaj menso superas ĝiajn leĝojn, kaj kiel birdo li flugas en la aero, rapide velas sur la maroj kaj fiŝosimile sondas la profundon kaj malkovras ĝiajn enhavaĵon. Vere, jen forta venko kontraŭ la naturleĝoj.

Same estas pri elektra energio: tiu dissalta violenta forto, kiu fendas montojn, estas tamen de la homo kaptata en globo! Jen evidenta trudiĝo en la naturleĝojn. Similmaniere la homo malkovras la kaŝitajn naturekretojn, kiuj laŭ la naturaj leĝoj devus resti kaŝitaj, kaj li transigas ilin el la nevidebla al la videbla mondo. Ankaŭ tio signifas trudiĝon en la naturleĝojn. Same li malkovras la internajn ecojn de aferoj, kiuj estas naturekretoj. Li ankaŭ ĵetas lumon sur pasintajn eventojn perditajn el la memoro, kaj per sia kapablo indukti antaŭvidas li ankoraŭ ne konatajn estontaĵojn. Krom tio: komunikado kaj malkovrado estas limigitaj de la naturleĝoj al etaj distancoj; sed la homo, pere de tiu interna potenco sia, kiu malkovras la realon de ĉio, ligas la Orienton kun la Okcidento. Ankaŭ tio ĉi estas trudiĝo en la naturleĝojn. Simile, laŭ la naturleĝoj ĉiuj ombroj estas efemeraj, sed la homo fiksas ilin sur plataĵon kaj ankaŭ tio ĉi estas trudiĝo en la naturleĝojn. Pripensu kaj kontemplu: ĉiuj sciencoj, artoj, metioj, inventoj kaj malkovroj iam estis naturekretoj kaj laŭ ties leĝoj devus resti kaŝitaj; sed la homo per sia malkovra potenco trudas sin en la naturleĝojn kaj transigas ilin el la nevidebla en la videblan mondon. Jen ankoraŭfoje okazas trudiĝo en la naturleĝojn.

Mallonge oni povas diri, ke la interna kapablo de la homo, nevidata de la okulo, forŝiras la glavon el la manoj de la naturo kaj donas al ĝi severan baton. Al ĉiuj aliaj estaĵoj, kiel ajn grandaj, mankas tiuj perfektecoj. La homo havas la kapablon voli kaj kompreni, sed la naturo ne havas ĝin. La naturo estas katenita, la homo estas libera. Al la naturo mankas komprenkapablo, la homo komprenas. La naturo ne konscias pri pasintaj eventoj, sed la homo ilin konscias. La naturo ne prognozas la estonton; la homo per sia perceptopovo vidas tion venontan. La naturo ne konscias pri si mem, la homo scias pri ĉio.

Se iu supozas, ke la homo estas nura parto de la natura mondo, kaj, ĉar li havas tiujn perfektajn kapablojn, kiuj estas nur manifestaĵoj de la natura mondo, kaj ke do la naturo estas la origina fonto de tiuj perfektaĵoj kaj ili ne mankas al ĝi, ni respondas al tiu, dirante: la parto

dependas de la tuto; parto ne povas posedi perfektaĵojn, kiuj mankas al la tuto.

Per la naturo ni celas nomi tiujn internajn ecojn kaj necesajn rilatojn derivitajn de la realo de la aferoj. Kaj tiuj realoj de la aferoj, kvankam ege diversaj, estas tamen intime ligitaj inter si. Por tiuj diversaj realoj estas bezonata ĉio-unuiga aganto, kiu ligas ilin ĉiujn unu al aliaj. Ekzemple, la diversaj organoj kaj membroj, la partoj kaj elementoj, kiuj konstistigas la homan korpon, kvankam unuopaj, tamen estas ĉiuj ligitaj unu al la aliaj per tiu ĉio-unuiga aganto konata kiel la homa animo, kiu kaŭzas, ke ili funkciu en perfekta harmonio kaj absoluta reguleco, tiel ebligante la daŭron de la vivo. Sed la homa korpo estas tute nekonscia pri tiu ĉio-unuiga aganto, kaj tamen ĝi agas regule kaj plenumas siajn funkciojn laŭ ĝia volo.

Se temas pri filozofoj, ili apartenas al du skoloj. Ekzemple Sokrato la saĝa kredis je la unueco de Dio kaj la postmorta ekzisto de la animo; ĉar lia opinio kontraŭis tiun de la mallarĝmensuloj de tiu epoko, tiu dia saĝulo estis venenita de ili. Ĉiuj diaj filozofoj kaj homoj saĝaj kaj komprenemaj, kiam ili observis tiujn senfinajn estaĵojn, opiniis, ke en tiu ĉi granda kaj senfina universo ĉio komenciĝas en la minerala regno, ke el la minerala estiĝas la vegeta regno, el la vegeta estiĝas la besta regno, kaj el la besta regno estiĝas la homa. La apogeo de tiu ĉi senlima universo kun ĝia tuta grandiozo kaj gloro estas la homo mem, kiu en tiu ĉi mondo certan tempon penas kaj suferas, kun diversaj malsanoj kaj doloroj, kaj fine disfalas, postlasante neniun spuron kaj neniun frukton. Se estus tiel, ne povus esti dubo, ke tiu ĉi senlima universo kun ĉiuj siaj perfektoj finiĝas fraŭde kaj trompe kaj sen rezulto, sen frukto, sen atingo kaj sen efiko. Estus ĝi komplete sen ia signifo. Ili estis konvinkitaj do ke tiel ne estas, ke tiu ĉi Granda Metiejo kun tuta sia potenco, sia kaptorna splendo kaj senfinaj perfektecoj, ne povas finfine neniiĝi. Certas do ke ekzistas ankoraŭ alia vivo kaj, same kiel la vegeta regno ne konscias pri la homa regno, ankaŭ ni ne scias pri la Granda Vivo posta, kiu sekvas la vivon de la homo ĉi tie malsupre. Nia nekompreno de tiu vivo estas tamen nenia pruvo, ke ĝi ne ekzistas. La minerala mondo, ekzemple, estas komplete nekonscia pri la homa mondo kaj ne povas ĝin kompreni, sed nekompreniteco de io ne pravas ĝian neekziston. Multnombraj kaj konvinkaj pruvoj ekzistas, kiuj montras, ke la senfina mondo ne povas finiĝi je tiu ĉi

homa vivo.

Pri la Dia Esenco: ĝi estas vere neniel determinita de io ekster ĝia propra naturo, kaj estas neniel komprenebla. Ĉar kion ajn la homo povas koncepti, estas realo kun limoj, ne senlima; ĝi estas limigita, ne ĉio-ampleksa. Ĝi povas esti komprenata de la homo kaj estas regata de li. Simile certas, ke ĉiuj homaj konceptoj estas dependaj, ne absolutaj; ke ili havas mensan ekziston, ne materian. Krome, diferenciĝo de etapoj en la kreita mondo estas obstaklo al la kompreno. Kiel do povas tio kreita koncepti la Realon de la absoluta? Kiel jam dirite, diferenciĝo de etapoj estas obstaklo al la kompreno. Mineraloj, plantoj kaj bestoj ne havas la mensajn kapablojn de la homo por malkovri la realon de ĉio, sed la homo mem komprenas ĉiujn etapojn sub si. Ĉiu supera etapo komprenas tion sub ĝi kaj malkovras ĝian realon, sed la malsupera ne konscias pri la supera kaj ne povas ĝin kompreni. Tial la homo ne povas kompreni la Esencon de la Dieco sed povas, per sia rezonkapablo, per observado, per siaj intuiciaj kapabloj kaj la rivela potenco de sia kredo kredi je Dio kaj malkovri la abundon de Lia graco. Li certiĝas ke, kvankam la Dia Esenco ne videblas per la okulo, kaj la ekzisto de Dio estas netuŝebla, tamen konvinkaj spiritaĵoj pruvigas la ekziston de tiu nevidata Realo. Sed la Dia Esenco en si mem estas preter ĉia priskribo. Ekzemple, la naturon de etero oni ne konas, sed ke ĝi ekzistas, estas certa pro la efikoj produktataj: varmo, lumo, kaj elektro estas ĝiaj ondoj. Per tiuj ondoj do la ekzisto de etero estas pruvita. Kaj kiam ni pripensas la elverŝadon de Dia Graco, ni certiĝas pri la ekzisto de Dio. Ekzemple, ni observas, ke la ekzisto de estaĵoj dependas de la kuniĝo de diversaj elementoj kaj ilia neekzisto dependas de la apartiĝo de iliaj konstituaj elementoj. Ĉar disfalo kaŭzas la malligiĝon de la diversaj elementoj. Tial, ĉar ni observas ke la kuniĝo de elementoj estigas la ekziston de estaĵoj, kaj ĉar ni scias, ke senlimaj estas la estaĵoj, la rezultoj, do kiel la Kaŭzo povas esti limigita?

Nu, formiĝo estas trispeca kaj nur trispece eblas: hazarde, necese kaj vole. La kuniĝo de la diversaj konstituaj elementoj de estaĵoj ne povas esti hazarda, ĉar ĉiu efiko devas havi kaŭzon. Ĝi ne povas esti pro neceso, ĉar tiukaze la formiĝo devus esti interna eco de la konstituaj partoj, kaj la interna eco de iu afero neniel povas esti aparta de ĝi, kiel lumo, kiu ĉion rivelas, varmo, kiu ekspansiigas elementojn, kaj la



sunradioj, kiuj estas la esenca eco de la suno. Sub tiaj kondiĉoj la apartiĝo de iu ajn formitaĵo ne eblas, ĉar la internaj ecoj de afero ne povas esti apartigitaj de ĝi. Restas la tria formiĝo, la vola, tio estas ke nevidata forto priskribita kiel la Prapotenco, kaŭzas la kunmetiĝon de tiuj elementoj kaj ĉiu formiĝo estigas apartan estaĵon.

La atributoj kaj perfektecoj kiaj volo, scio, povo kaj aliaj praaj atributoj, kiujn ni atribuas al la Dia Realo, estas la signoj reflektantaj la ekziston de estaĵoj en la videbla mondo kaj ne la absolutaj perfektecoj de la Dia Esenco, kiuj ne estas kompreneblaj. Ekzemple, kiam ni konsideras kreitaĵojn, observas ni senlimajn perfektecojn, kaj, ĉar la kreitaĵoj estas plene regulaj kaj perfektaj, ni deduktas, ke la Prapotenco, de kiu dependas la ekzisto de tiuj aferoj, ne povas esti senscia; tial ni diras, ke Li estas Ĉio-scia. Ĉar estas certe, ke Li ne estas senpova, do Li devas esti ĉiel-potenca; Li ne estas malriĉa, do Li devas esti la Ĉio-Posedanta; Li ne estas neekzistanta, Li devas esti Eterna. La celo estas montri, ke tiuj atributoj kaj perfektecoj preparolataj koncerne tiun Universalan Realon, servas nur por nei malperfektecojn, ne por aserti la perfektecojn percepteblajn de la homa menso. Tial ni diras, ke Liaj atributoj estas nekoneblaj.

Konklude, tiu Universala Realo kun ĉiuj siaj kvalitoj kaj atributoj, kiujn ni menciis, estas sankta kaj ekzaltita super ĉiuj mensoj kaj komprenpovo. Sed kiam ni kun malfermita menso meditas pri tiu ĉi senfina universo, ni observas, ke movo sen mova forto, kaj efiko sen kaŭzo estas same neeblaj; ke ĉiu estaĵo ekeksistis pro diversaj influoj kaj daŭre submetiĝas al reagoj. Tiuj influoj formiĝas pro la agado de ankoraŭ aliaj influoj. Ekzemple, plantoj kreskas kaj floras pro la elverŝado de printempaj pluvoj, dum la nubo mem formiĝas pro diversaj aliaj agantoj, kaj tiuj agantoj siavice estas sub la influo de ankoraŭ aliaj agantoj. Ekzemple, plantoj kaj bestoj kreskas kaj evoluas sub la influo de tio, kion la filozofoj de nia epoko nomas hidrogeno kaj oksigeno kaj estas inluataj de tiuj du elementoj; kaj tiuj ĉi siavice formiĝas pro ankoraŭ aliaj influoj. Same oni povas paroli pri aliaj estaĵoj, ĉu ili efikas aliajn aferojn aŭ estas sub ties efikoj. Tia kaŭzoprocezo daŭras, kaj aserti, ke tiu procezo estas senfina, estas klara absurdaĵo. Do tia kaŭzoĉeno devige kondukas fine al Li, kiu estas la Ĉiam-Vivanta, la Ĉiel-Potenca, kiu estas dependa nur de Si Mem kaj la Lasta Kaŭzo. Tiu Universala Realo ne povas esti sensata, ĝi ne povas

esti vidata. Devas esti tiel, ĉar ĝi estas Ĉio-Ampleksa, ne limigita, kaj tiaj atributoj distingas la efikon sed ne la kaŭzon.

Kaj kiam ni pripensas, ni observas, ke la homo similas al eta organismo ene de frukto; tiu frukto evoluis el la burĝono, la burĝono kreskis el la arbo, la arbo estas nutrata de suko, kaj la suko estiĝis el tero kaj akvo. Kiel do povas tiu eta organismo kompreni la naturon de la ĝardeno, koncepti la ĝardeniston kaj kompreni lian estadon? Klare tio ne eblas. Se tiu organismo komprenus kaj pripensus, observus ĝi, ke tiuj ĝardeno, tiu ĉi arbo, tiu ĉi burĝono, tiu ĉi frukto neniel povis el si mem ekekesti en tia ordo kaj perfekteco. Simile saĝa kaj pripensanta animo certiĝos, ke tiu ĉi senfina universo kun sia tuta grandiozo kaj perfekta ordo ne povintus per si mem ekestiĝi.

Simile ekzistas en la mondo de la estado fortoj nevidataj de la okulo, kiaj la forto de etero jam menciita, kiuj nesenseblas, nevideblas. Tamen per ĝiaj efikoj, tio estas per ĝiaj ondoj kaj vibradoj, aperas kaj manifestiĝas lumo, varmo kaj elektro. Samas rilate al la povo kreski, senti, kompreni, pensi, memori, imagi kaj rekoni; ĉiuj tiuj internaj kapabloj estas nevidataj de la okulo kaj nesenseblaj, sed ĉiuj estas evidentaĵoj per siaj efikoj.

Pri la senfina Potenco, kiu ne havas limojn: limoj mem pruvas la ekziston de la senlima, ĉar la limigita estas konata pere de la senlima, same kiel malforto en si pruvas la ekziston de potenco, senscio la ekziston de scio, malriĉeco la ekziston de riĉeco. Sen riĉeco ne estus malriĉeco, sen scio ne estus senscio, sen lumo ne estus mallumo. Mallumo mem estas pruvo de la ekzisto de lumo, ĉar mallumo estas manko de lumo.

La naturo estas nur la esencaĵoj kaj la necesaj rilatoj interne de la realo de aferoj. Kvankam tiuj sennombraj realaĵoj diversas laŭ sia karaktero, ili estas en absoluta harmonio kaj firme interplektitaj. Kiam oni komprenkapablo plilarĝiĝas kaj oni observas atente, oni scias certe, ke ĉiu realaĵo estas nur esenca bezonaĵo de aliaj realaĵoj. Tial interligi kaj harmoniigi tiujn diversajn kaj sennombrajn realaĵojn, bezonatas ĉio-liga Potenco, por ke ĉiu parto de ekzistanta estaĵo plenumu sian propran funkcion en perfekta ordo. Pripensu la korpon de la homo, kaj lasu la parton esti indiko pri la tuto. Pripensu, kiel tiuj diversaj partoj kaj membroj de la homa korpo estas intime ligitaj kaj

harmonie unuigitaj inter si. Ĉiu parto estas esenca bezonaĵo de ĉiuj aliaj partoj kaj havas propran funkcion. La menso estas la ĉion-liga aganto, kiu tiel unuigas ĉiujn konsistigajn partojn unu al la aliaj, ke ĉiu plenumas sian specifan funkcion en perfekta ordo, kaj tiel kunlaboro kaj interago eblas. Ĉiuj partoj funkcias laŭ certaj leĝoj, kiuj esencas por la ekzisto. Se tiu ĉion-liga aganto, kiu stiras ĉiujn tiujn partojn, iel difektiĝus, ne estas dubo, ke la konsistigaj partoj kaj membroj ĉesus ĝuste funkcii; kaj kvankam la ĉion-liga aganto en la templo de homo ne estas sensata aŭ vidata kaj ĝia realo estas nekonata, ĝi tamen per siaj efikoj manifestiĝas en pleja potenco.

Estas do pruvita kaj evidentigita, ke tiuj sennombraj estaĵoj en tiu ĉi mirinda universo plenumas sian funkcion ĝuste nur se stirataj kaj regataj de tiu Universala Realo, tiel ke ordo estu establita en la mondo. Ekzemple, interagado kaj kunlaborado inter la konsistigaj partoj de la homa korpo estas evidentaj kaj nedisputeblaj, sed tio ne sufiĉas; necesas ĉion-liga aganto, kiu stirtas kaj regas la konsistigajn partojn, tiel ke tiuj ĉi per interagado kaj kunlaborado plenumu en perfekta ordo siajn necesajn kaj proprajn funkciojn.

Vi bone konscias, laŭdata estu la Sinjoro, ke kaj interagado kaj kunlaborado evidentiĝas kaj estas pruvitaj inter ĉiuj estaĵoj, kaj grandaj kaj etaj. Se temas pri grandaj korpoj, interagado manifestiĝas tiel evidente kiel la suno; se temas pri malgrandaj: kvankam interagado eble estas nekonata, tamen la parto indikas pri la tuto. Ĉiuj tiuj interagadoj estas ligitaj per tiu ĉion-ampleksa potenco, kiu estas ilia pivoto, ilia centro, ilia fonto kaj ilia movanta forto.

Ekzemple, kiel ni observis, kunlaboro inter la konsistigaj partoj de la homa korpo estas klare konstatita, kaj tiuj partoj kaj membroj plenumas servojn al ĉiuj konsistigaj partoj de la korpo. Ekzemple la mano, la piedo, la okulo, la orelo, la menso, la imagopovo ĉiuj helpas la diversajn partojn kaj membrojn de la homa korpo, sed ĉiuj tiuj interagadoj estas ligitaj de nevidata, ĉion-ampleksa potenco, kiu kaŭzas, ke tiuj interagadoj perfekte regule okazas. Tio ĉi estas la interna kapablo de la homo, tio estas liaj spirito kaj menso, kiuj ambaŭ estas nevideblaj.

Simile pensu pri maŝinoj kaj fabrikoj kaj la interagado inter la diversaj konsistigaj partoj kaj sekcioj, kaj kiel ili estas inter si kunligitaj. Ĉiuj

tiuj rilatoj kaj interagadoj estas ligitaj al centra potenco, kiu estas ilia movanta forto, ilia pivoto kaj fonto. Tiu centra potenco estas aŭ la vaporo aŭ la lerteco de la mastromenso.

Estas do evidentigita kaj pruvita, ke interagado, kunlaborado kaj interrilatado inter aferoj estas sub la stirado kaj volo de movanta Forto, kiu estas la origino, la movanta forto kaj la pivoto de ĉiuj interagoj en la universo.

Similmaniere ĉiujn aranĝon kaj formiĝon, kiuj ne estas perfektaj en sia ordo, ni nomas hazardaj; kaj tiun, kiu estas bonorda, regula, perfekta en siaj rilatoj kaj kies ĉiu parto estas en la ĝusta loko kaj estas la esenca bezonaĵo de la aliaj konsistaj partoj, ni nomas kunmetaĵo formita per volo kaj scio. Estas sen dubo, ke tiuj ĉi sennombraj estaĵoj kaj la asociiĝo de tiuj ĉi diversaj elementoj aranĝitaj en sennombraj formoj devis fondi el Realo, kiu ne povas iel ajn esti sen volo aŭ kompreno. Tio estas klara kaj pruvita al la mensoj kaj neniu povas tion nei. Tio tamen ne volas diri, ke la Universala Realo aŭ ĝiaj atributoj estas komprenitaj. Neniu iam komprenis aŭ ĝiajn Esencon aŭ ĝiajn verajn atributojn. Ni tamen asertas, ke tiuj sennombraj estaĵoj, tiuj necesaj interrilatoj, tiu perfekta ordo devige emanis el fonto, al kiu ne mankas volo kaj kompreno, kaj tiu senlima kunmeto en sennombrajn formojn devas esti kaŭzita de ĉion-ampleksa Saĝo. Tion oni povas neniu krom persista obstinulo, kiu neas klaran kaj nemiskompren-eblan pruvon kaj evidentgas tiun ĉi sanktan Verson: »Ili estas surdaj, ili estas mutaj, ili estas blindaj, kaj ili ne plu revenos.«

Pri la demando, ĉu la kapabloj de la mensoj kaj la homa animo estas unusama afero: tiuj kapabloj estas nur la internaj ecoj de la animo, kiaj la imagopovo, pensado kaj kompreno; tiuj estas kapabloj esence bezonataj por la homa ekzistado, same kiel ĝiaj radioj estas la interna eco de la suno. La templo de la homo similas al spegulo, lia animo estas kiel la suno kaj liaj mensaj kapabloj kiel la radioj emanantaj el tiu lumofonto. La radio eble ĉesas fali sur la spegulon, sed ĝi estas neniel disigebla de la suno.

Mallonge, temas pri tio, ke la mondo de la homo estas supernatura en siaj rilatoj al la mondo de la vegetaĵoj, kvankam reale ĝi ne estas tia. Kompare kun planto estas la realo de la homo, liaj aŭd- kaj vidpovoj, supernaturaj kaj ne eblas, ke planto komprenas la realon kaj la

potencojn de la homa menso. Simile al homo neniel eblas kompreni la Dian Esencon kaj la naturon de la granda Postmorto. La kompatplenaj elverŝaĵoj de tiu Dia Esenco tamen atingas ĉiujn estaĵojn, kaj necesas, ke la homo pripensu en sia koro la emanaĵojn de Dia Graco, de kiuj la animo estas unu, pli ol pri la Dia Esenco mem. Jen la ekstrema limo de la homa komprenpovo. Kiel jam menciita, tiujn priparolatajn atributojn kaj perfektecojn de la Dia Esenco ni konkludis pro la ekzisto kaj observado de aferoj, kaj ne temas pri tio, ke ni komprenas la esencon kaj perfektecon de Dio. Kiam ni diras, ke la Dia Esenco komprenas kaj estas libera, ni ne celas diri, ke ni malkovris la Dian Volon kaj Celon, sed ke ni akiris scion pri ili pere de la Dia Graco rivelita kaj manifestata en la realo de la aferoj.

Pri niaj sociaj principoj, nome la instruoj de Lia Sankta Moŝto Bahá'u'lláh, disvastigitaj antaŭ kvindek jaroj: ili vere ampleksas ĉiujn aliajn instruojn. Estas klare kaj evidente, ke sen tiuj instruoj progreso kaj evoluo de la homaro neniel eblas. Ĉiu komunumo de la mondo trovas en tiuj Diaj Instruoj la realigon de siaj plej altaj aspiroj. Tiuj instruoj similas arbon, kiu inter ĉiuj arboj portas la plej bonajn fruktojn. Filozofoj, ekzemple, trovas en tiuj ĉielaj instruoj la plej perfektan solvon de siaj sociaj problemoj, kaj same veran kaj noblan klarigon de filozofiaj demandoj. Simile kredantoj vidas la realon de la religio manifeste rivelita en tiuj ĉielaj instruoj kaj klare kaj konvinke pruvas, ke ili estas la reala kaj vera kuraco de la malsanoj kaj malfortaĵoj de la tuta homaro. Se tiuj grandiozaj instruoj disvastiĝos, la homaro estos liberigita de ĉiuj danĝeroj, de ĉiuj kronikaj malsanoj kaj perturboj. Simile la ekonomikaj principoj de la Bahaa Kredo estas la enkorpiĝo de la plej altaj aspiroj de ĉiuj dungitoj kaj de ekonomikistoj de ĉiuj skoloj.

Mallonge, ĉiuj sekcioj kaj partioj vidas siajn aspirojn realigataj en la instruoj de Bahá'u'lláh. Kiam tiuj instruoj estas deklarataj en kirkoj, en moskeoj kaj aliaj adorejoj, ĉu de la sekvantoj de Budho aŭ de Konfuceo, en politikaj rondoj aŭ inter materiistoj, ĉiuj atestos, ke tiuj instruoj donas freŝan vivon al la homaro kaj konsistigas la tujan rimedon kontraŭ ĉiaj malsanoj de la socia vivo. Neniu povas trovi erarojn en iu el la instruoj, male, se iam deklaritaj, estos ili akklamataj kaj ĉiuj agnoskos ilian nepran neceson, dirante: »Ja vere, jen la vero, kaj apud la vero ekzistas nenio krom evidenta eraro.«

Konklude: tiuj ĉi malmultaj vortoj estas skribitaj kaj al ĉiuj ili estos klara kaj evidenta pruvo de la vero. Pripensu ilin en via koro. La volo de ĉiu suvereno validas dum lia regado, la volo de ĉiu filozofa esprimiĝas en kelke da adeptoj dum lia vivo, sed la Potenco de la Sankta Spirito radie brilas en la realaĵoj de la Mesaĝistoj de Dio kaj plifortigas Ilian volon tiel, ke ĝi influas grandan nacion dum jarmiloj kaj revigligas la homan animon kaj revivigas la homaron. Pripensu la grandecon de tiu ĉi potenco! Ĝi estas eksterordinara Potenco, ĉiel-sufiĉa pruvo de la vero de la misio de la Profetoj de Dio kaj konvinka pruvo de la potenco de Dia Inspiro.

La Gloro de Gloroj restu sur vi.

Hájfo, la 21-an de septembro 1921